

# ATESTO PRI SUPERA LERNADO

Bourg-en-Bresse 2007

## DETRADUKO

Bernat tiam stariĝis. Li aliris ŝin, antaŭ ŝiaj okuloj kreskis la vidaĵo. Nun li jam ne povis heziti, ne plu...! Tio estus superflua sufero. Se... se ĉiam plu same ili vivos, se li ne eldirus ĉion, kio kolektiĝis en lia animo. Finfine li devos paroli pri tio, kaj poste certe ĉio fariĝos alia. Kata, Kata...

Li eĉ eldiris antaŭ ol tuŝi ŝin:

-Kata...

Ŝi komprenis. Ŝi ĉion komprenis, eble eĉ multe pli frue ol li. Kata ridetis. Tiu rideto estis permesanta kaj alloga. Kata mem estis la rideto. Kiel onda dorso de arbaroj spiras sur montdeklivoj, kiel lagoj respegulas la ĉielon. Kiel birdaro flugas alten, alten. Super kanaroj kuregas la varma vento.

Kata samtempe estis floro kaj birdo kaj ruĝkapa cinklo. Ĝi falis en blankajn ŝaŭmojn, ĉirkaŭita de gutoj leviĝis kaj reflugis denove, naskinĝinta en ĉielarko. Kiel arbara ciklameno kaŝiĝis inter la karpenoj, klininĝinta ofte inter aliaj arbustoj. Al la violkolora floro flugis abeloj... Kaj samtempe ŝi estis fiŝeto, tien-reen zigzage naĝanta kun dorseto ĉielarka, eta estaĵo. Kaj animo kaj korpo; kreskaĵo, besto kaj homo, ŝtono kaj akvo, vento kaj fajro.

Vento... La flamoj etendiĝis jam en ŝiaj okuloj, sed ŝi ankoraŭ atendis. Ŝi ankoraŭ defendis sin senmove. Se Bernat ne proksimiĝos, ŝi faros nenion. Estis en ŝi timo kaj sindeteno. Kio estos, kio povos esti...?

Istvan Nemere

*Pigre pasas la nokto, 1992*